

**La Damno
de
Sankta
Guynefort**

Franca titolo de la verko :

La Damnation de Saint Guynafort

Verkis en 1901 **Eugène Le Roy** (1836 – 1907)

Tiu verko enhavas multe da okcitanaj regionaj vortoj kaj esprimoj.

Provis tamen esperantigi Jacques Ravary.

Konsilis kaj reviziis Paul Signoret (Francio) kaj Raïta Pyhälä (Finnlando).

UNUA ĈAPITRO

Vi ne konas La Noaillette, ĉu ne ? Tio ne multe mirigas min. Estas eta vilaĝo kun sep aŭ ok domoj, antaŭlonge ĉefa loko de paroko kun ĉirkaŭ tridek hejmoj, hodiaŭ kunigita al tiu de Saint-Agnan-d'Hautefort, en la lando Périgord. La malfortika preĝejo konstruita el ŝtonoj de ruĝa grejso, dispecigitaj de la tempo, kie oni ankoraŭ faras la meson en la tago de la patrona festo, plu surhavas sian kolombejan sonorilturon, kies sonorilon bonvolema pedelo ĉiutage obstinas svingi, je la laŭritaj horoj de Anĝeluso. Sub la pavimo kun larĝaj slaboj, kavigitaj de la lignoŝuoj de multnombraj generacioj, pelmele amasiĝas, en la malnovaj sepultejoj de malaperintaj familioj, ĉarplenoj da ostoj kiuj atendas, por malimplikiĝi, la venon de la anĝelo, kiu devas soni la veksignalon de la Lasta Juĝo.

Kaj precize pri afero de tomba koncesio apuda al la altaro de sankta Guynefort, koncesio trovita meze inter originaloj de deksepjarcenta notario, mi konatiĝis kun tiu sanktulo.

Mi unue kredis pri la identeco de tiu kaporalo de la ĉiela taĉmento, kun la patrono de la paroko de Villeneuve-de-Dombes. Mi des pli kredis tion, ke sankta Guynefort de Villeneuve havas la fakon kuraci la infanajn malsanojn, kaj ke en La Noaillette ekzistas, en la tombejo, fonto kien oni iras mergi, – « saŭcumi » kiel oni diras en la regiono – la malsanajn infanojn. Sed mi rapide komprenis ke nomsimileco erarigis min. Sankta Guynefort de La Noaillette ne estas la sama kiel tiu de Villeneuve, kaj ne estas ordinara sanktulo, ĉar li estas damnita.

Estas vere, ke ankaŭ lia kolego de la lando Dombes ne estas banala sanktulo, ĉar li estis dum sia tuta vivo levrelo. Ĉar tiu hundo estis maljuste mortigita per spadopiko fare de la sinjora Moŝto, sia mastro, la bonuloj de la lando opiniis, ke la detruo de la kastelo de tiu barbara mastro, kiu okazis kelkan tempon poste, estis puno de la ĉielo. Tiu sento de justeco kompatema al la bestoj, baldaŭ degeneris en veran kulton honore al hunda martiro. La patrinoj alportis siajn malsanajn infanojn sur ĝian tombon, kaj okazis tie, evidente, miraklaj resaniĝoj. Kvankam pli poste ĵaluza monaĥo, Etienne de Bourbon, igis elterigi kaj bruligi la korpon de tiu levrelo Guynefort, ĝi estas ankoraŭ kultata en la regiono kaj plu resanigas la infanojn, kiel oni povas vidi tion en la Historio de la Franca Civilizacio de Sinjoro Alfred Rambaud : mi tute ne rakontas stultaĵojn.

La sankta Guynefort de La Noaillette ne estis hundo, li, sed viro kaj eĉ lerta viro, kiel vi konstatos tion.

En la jaro de la kristana erao 1250, la jaro mem kiam la reĝo Sankta Luizo estis kaptita en Mansourah, aprilan matenon, la masonistoj kiuj konstruis la preĝejeton de La Noaillette vidis veni, de la flanko de Chasseins, nekonatan viron, kiu malsupreniris en la valetan, trairis la rojon Beuse, sur laŭcele metitaj ŝtonoj, kaj grimpis sur la monteton laŭirante vojon, kiu ankoraŭ ekzistas, sed tiel kavigita de la

tempo, ke la branĉoj de la maljunaj kverkostumpoj, kiuj kreskas rande de ĝi, kuniĝas super la kapo de la homoj, kiuj pasas tie.

Alveninte al la pinto de la suprenirejo, la ulo troviĝis ĝuste antaŭ la konstruejo de la preĝejo kaj salutis la laboristojn. Tiuj ĉi ĝentile reciprokis al li la saluton kaj dum tempeto rigardis lin.

Fakte, la viro estis inda je tio. Estis granda fortika viglulo, vestita per felkolora krudlanŝtofa robo, kun pelerino ornamita per transmaraj konkajoj kaj pinta kapuĉo, kiu servis al li kiel kapvesto kiam la vetero estis malbona. Nun, tiu kapkovrilo pendis sur la dorso de la fremdulo, kaj malkovris densan kaj nigran hararaĉon, kaj ankaŭ frizitan barbon, kiu grimpis preskaŭ ĝis liaj okuloj.

La pilgrimanto sidiĝis sur ŝtona bloko, kun sia pilgrimbastono enmane al kiu estis ligita kukurbobotelo, – kiun ni, lokanoj, nomas « *coujou* », – kaj rigardis la masonistojn, kiuj denove eklaboris. Ili estis kvarope kiuj, kun metilernanto, pene provis suprenlitigi dikan ŝtonon de angulo, laŭlonge sur klina ebena de trabego. Vidante ke ili pene anhelas por tion fari, la viro metis sian pilgrimbastonon kontraŭ la muron kaj venis helpi la laboristojn.

- Levu ! – li kriis, – kaj, levite, la peza ŝtono antaŭeniris je almenaŭ futo kaj duono.

- Dankon al vi ! – diris unu el la limoĝiaj masonistoj al pilgrimanto, kiam la ŝtono estis ĝuste lokita ; – vi ne estas tro kaduka !

Li ridetis. – Vi ŝajnas al mi bravuloj, li diris. Mi volas helpi vin, eĉ poste kiam mi plu iros mian vojon...Vi bezonas «*cabre*»-on -kaprinon- ; se ne, sen ĝi, vi bezonos tro da tempo por tiel levi ŝtonojn, morteron kaj lignon, kvankam vi forte penos.

- Ĉu « *cabre* ? » – diris unu el la laboristoj, mirigita.

- La « *cabre* » kaj ĝia masklo, la virkapro, estas malbonaj bestoj de la diablo ! – aldonis aliulo.

La pilgrimanto denove ridetis. – Ne timu, bravuloj. Unu kiu alvenas el sankta lando ne volas instigi vin al danneblaj rilatoj kun tiu malbona besto de Satano. Mi parolas al vi pri aparato, kiu levos viajn ŝtonblokojn en taŭga loko kaj ĉiujn materialojn tre facile...Jen, tiel aspektas tiu maŝino...

Kaj, per sia pilgrimbastono, la migrulo strekis sur tero kvazaŭ grandan A.

- Proksimume ĉe la pinto, li diris, estas rado plena, kun kavigita randumo, kiun oni nomas pulio. Preskaŭ ĉe la malsupro, estas vinĉo funkciigata per stangoj, kie volviĝas ŝnurego kiu, pasante sur la tiel nomata pulio, levas je necesa alteco ĉiujn aĵojn, laŭdezire.

- Vi havas la inteligenton tiel bona, kiel la pugnoforton – diras la majstromasonisto – .Ĉu estus tro maldiskrete demandi vin, ĉu tre urĝas al vi foriri ?

- Urĝas al mi alveni al mia patra lando; sed, por helpi vin, mi iomete malfruos.

- Do, ĉu plaĉus al vi montri al ĉarpentistoj, kiuj dissegas la lignon, kiel munti la supre diritan kaprinon ?

- Tre volonte, mi faros tion, bravuloj, kontentega helpi vin en via sankta entrepreno.

- Ni dankas vin multe pro via granda honesteco kaj bonvolo!

- Inter kristanoj, miaj amikoj, oni devas sin helpi.

- Se do vi volas tion, ni iru al la laborejo de la metikompanoj de Lia sankta Moŝto Jozefo.

- Ek al!

DUA ĈAPITRO

La morgaŭon, la kaprino estis preta por plenumi sian servon, sed mankis sufiĉe fortaj ŝnuregoj, ĉar la ŝnuroj de la putoj de la vilaĝo estis tro malfortaj. Dum la estro de la limoĝianoj skrapis sian kapon, prezentiĝis nobeleta nomata Hélié Joffre, kiu loĝis en nobela domo situanta inter La Noaillette kaj Hautefort, nomata per lia nomo : Joffrenie.

- Estas abundo da ŝnuregoj por la militmaŝinoj, en la kastelo de Hautefort, – diris tiu ulo, kiam oni klarigis al li la aferon ; – mi tuj petos tion de sinjoro Aymar.

La honesta eskviro, eksciinte de la masonistoj, ke la fremda migrulo estis doninta la planon de la tiom inĝenia aparato, kondukis lin al sia hejmo, kaj, survoje, kun intereso eksciis, ke lia nomo estas Guynefort, ke li estas kleriko, investita de la pastreco – kvankam malinda je ĝi – kaj revenas el la sankta lando, trairinte multajn strangajn regionojn kaj vidinte multe da eksterordinaraj aĵoj.

Invitita por vespermanĝi en Joffrenie, la pilgrimanto mirigis siajn gastigantojn per la rakonto de siaj mirindaj aventuroj. Sinjorino Sybille, dommastrino, atente aŭskultis la parolojn de la sankta viro, kiu estis genuiĝinta ĉe la tombo de Kristo, kaj realportis el Jerusalemo ĉeneron de la kateno, per kiu Simon Barjone, alinome : sankta Petro, estis ligita laŭ la ordono de la aĉa reĝo Herodo, kiel tio estas skribita en la ĉapitro XII de la Agoj de la apostoloj.

- Kaj tiun ĉeneron...ĉu vi havas ĝin ? – ŝi demandis per voĉo tremanta pro emocio.
- Ĝi estas tie, – respondis Guynefort, metante la manon malsupre de sia dekstra cico, en la pozicio : la armilon ĉe la brako.
- Ĉu plaĉus al vi montri ĝin al ni ?
- Pro via konsidero, tre volonte.

Kaj la pilgrimanto altiris el unu de la multnombraj subaj poŝoj de sia robo, paketon kovritan per kruda ŝtofo el kaprina vilaro. Demetite, tiu unua volvaĵo vidigis duan el striita lanaĵo. Sub tiu ĉi montriĝis tria kovro el blua veluro. Laŭmezure, kiel la pilgrimanto zorgege malkovris la paketon, la vizaĝo de la geedzoj prenis esprimon de respekta emocio. Fine, kiam li malvolvis la skarlatan silkmuaron, kiu enhavis la respektingdan ĉeneron kaj li montris ĝin al siaj gastigantoj, tiuj ĉi genuiĝis.

Alvokite, patro, patrino, infanoj, kaj servistoj, pie kisis la sanktan relikvon prezentitan de la pilgrimanto, kiu poste reenŝovis ĝin en ĝiajn multajn kovrojn, kaj, fine, en sian sekretan poŝon.

Poste, Guynefort rakontis pro kia sinsekvo da eksterordinaraj cirkonstancoj la altvalora ĉenero alvenis en lian posedon. Li estis devigata ŝajnigi sin apostato, kaj kondukti iom judece, por ruzkapti la fidon de la riĉa komercisto, kiu konservis ĝin, kiel familian talismanon, transdonitan de generacio al generacio, ekde la provoso en la

malliberejo, kie estis karcerigita Petro...

- Jesuo ! – diris tiuj bravuloj, aŭdante la senfinajn fabelojn de la imagema pilgrimanto.

Fine, Guynefort konfesis, ke li estis devigita kaŝe-lerte ŝteli la sanktan relikvon, por ne rezigni ĝin en la manoj de kruela provoso de Nia-Sinjoro. Li konfesis tiun pian ŝteleton ; tamen, lia konscienco kelkfoje riproĉis al li tion...

- Ho ! – protestis ĉiuj ĉeestantoj.

- Neniam vi faris pli meritan agon ! – diris la eskviro Joffre.

Ĉirkaŭ la naŭa vespere, manĝinte, anstataŭ maronojn, kaŝtanojn « *camberones* » trinkfestitajn per griza malforta vino el la loko, ĉiuj enlitiĝis, ankaŭ la pilgrimanto, kiu konsentis pri tiu kroma afablaĵo sen tio, ke oni devus peti lin multe.

Noktmeze, la brava nobelo kaj lia nobela edzino estis vekitaj de stranga bruoj, kiu devenis de la najbara dormo-ĉambro, kie enlitiĝis Guynefort. Estis kvazaŭ batoj per bastono aŭ ŝnuro, frapantaj korpon, kiu aŭdigis obtuzan sonon.

- Estas la pilgrimanto, kiu vergas sin ! – diris sinjorino Sybille.

- Tio profitu al li, amikino mia! respondis al ŝi, kisante ŝin, post granda krucosigno, siro Joffre, kiu estis vekiginta bonhumore.

Dume, draŝinte la trakusenon per skurĝbatoj unu kvaronhoron, la pilgrimanto remetis sur ĝin sian kapon kaj ne malfruis ronki.

La morgaŭon, ĉe ellitiĝo, nia viro, solide matenmanĝinte kun sia gastiganto, preskaŭ tuj foriris al la preĝeja laborejo, kie li restis ĝis tagmezo, helpante la laboristojn per siaj konsiloj, kaj kelkfoje ankaŭ per siaj brakoj. Kiam laŭ la pozicio de la suno la majstro-masonisto opiniis, ke estas la ĝusta tempo por tagmanĝo, la pilgrimanto revenis en Joffrenie, kie primetita tablo atendis lin.

Post la tagmanĝo, li denove reiris al la laborejo, kaj kiam la supre citita suno malsupreniris malantaŭ la monteton de La Mothe, li unu plian fojon vojiris al Joffrenie kie, je la sepa, oni surtabligis la vespermanĝon.

Kaj la samo okazis plue en la sekvantaj tagoj. Estis kvazaŭ ekzistus, inter la pilgrimanto kaj ties gastigantoj, nevortigita konsento : li por gastigi, ili por gastigi, laŭ la perigorda kutimo, tio estas malavara, kompleta kaj tutkora.

Fine de la semajno, tamen, avidemo ĝermis en la menso de la du geedzoj. Ili deziregis la relikvon de la pilgrimanto, kaj revis pri rimedo proprigi ĝin al si. Eble ne por ili propre, sed por la estonta preĝejo de La Noaillette, al kiu ĝi donus brilon farante miraklojn, kiel tio ne povus manki.

Unue ili pensis aĉeti ĝin ; sed, sen ia dubo, la kleriko Guynefort cedus ĝin nur kontraŭ alta sumo, kiun malgrandaj kampnobeloj kiel ili ne povus pagi. Sekve, kial ne ŝteli ĝin de li ? En tiuj tempoj de arda fido, oni ne hezitis kulpi tiaspecan ŝteleton, kiun la intenco sanktigis. La historio de la mortotuko de Cadouin, tiom da fojoj ŝtelita kaj reŝtelita, liveras pri tio ateston.

Sed, ĉe la unua ekvido, la afero ne ŝajnis facila, eĉ ĉe la dua. La vestaĵoj de la pilgrimanto estis ĉiam strikte laĉitaj, kaj li neniam demetis sian frokon, eĉ dumnokte, ĉar li vestite kuŝis por humiligi sian korpon. Kiel li humile diris, li nur momente malkovriĝis por sin skurĝi.

La malfacileco ŝteli de Guynefort lian valoran relikvon ekĝermigis en la menso de sinjorino Sybille pli honestan projekton.

- Kion vi intencas fari koncerne la sanktan ĉeneron ? – ŝi demandis iun tagon tagmanĝante al pilgrimanto.

- Se tio plaĉas al Dio, mi deponos ĝin en la preĝejon de mia naskiĝa paroko, kie ĝi sendube faros miraklojn.

- Kaj kie troviĝas via naskiĝloko ? se mi ne estas tro scivolema, – demandis la eskviro.

- En Aŭvernjo kaj en la diocezo Saint-Flour, – neprecize respondis Guynefort.

- Via projekto estas pia kaj ege laŭdinda, – aldonis sinjorino Sybille – tamen konsideru ke la paroko kie vi estis baptita estas provizita per parokestro, aŭ prioro, aŭ preposto, tiel ke, post la transdono farita de vi, ĉiuj materiaj avantaĝoj, kiujn la relikvo havigos al la supre citita paroko, profitos al aliulo...

- Ho ! Mi ne strebas al la difekteblaj posedaĵoj de tiu surtera mondo ! – humile intermetis Guynefort.

- Dio mia, mi kredas tion, sankta viro ! Sed tamen atentu, ke necesas helpi la korpon por ke ĝi povu prizorgi la servadon de la Sinjoro, kaj, por tion fari, manĝi kaj trinki...konsekvence havi beneficon...

- Iom sufiĉos al mi, – diris la pilgrimanto.

- Bonege, – diris siavice la eskviro, – ĉar vi estas kleriko, kial vi ne estus la parokestro de nia paroko, kien Dio ŝajne kvazaŭ permanente kondukis vin ?

Ĝi estas malgranda, sed tamen, konsistante el dismoj, naturaj aŭ monaj rentoj, oferoj kaj aliaj mondonacoj, pli ol sufiĉa por konservi en korpa bonfarto honestan parokestron, kaj plie provizi lin per rimedoj helpi al la malriĉuloj de Nia-Sinjoro Jesuo-Kristo.

- Mi estus feliĉa restadi inter bonaj kristanoj, kiaj vi estas, ĉar Dio volis ke mi venis tien, – diris la pilgrimanto, – tamen donu al mi la tempon por pensi pri tio ĉinokte.

- Tre volonte, – samtempe respondis la geedzoj.

Dum tiu nokto, la trakuseno de Guynefort suferis mistraktadon. Plurfoje sinjorino Sybille, vekita de la bruoj, perkubute puŝis sian edzon :

- Tiu povrulo sin mortigos, tiel farante !

- Ni esperu ke ne, amikino mia ! li plenumas sian devon, ni imitu lin.

Je sia ellitiĝo, la morgaŭon, Guynefort deklaris, ke Dio inspiris lin, kaj ke li cedas al la peto de siaj gastigantoj, tamen nesolvita restis la demando pri la benefico...Kiu estis la dondecidanto ?

- Kiel en nombraj parokoj tenataj en sekulara benefico, la parokestro nepre estu, laŭ la antikva kutimo, elektita de la parokanoj, – respondis siro Joffre.

- Sed tio ne maltrankviligu vin. Ni iros kune en ĉiujn vilaĝojn, en ĉiun hejmon,

kaj eĉ unu voĉo ne mankos al vi.

- Tiel, estos la volo de Dio manifestita per la popola voĉo, – respondis
Guynefort : « Vox populi, vox Dei ».

De li venas tiu sentenco, kiun, de tiam, oni tiel ofte uzis kaj misuzis.

TRIA ĈAPITRO

Kvar monatojn poste, la malgrandeta preĝejo de La Noaillette estis farita kaj finfarita. La ĉarpentistoj metis sur la pinton de la sonorilejo belan bukedon, kiu estis konvene trinkfestita la postan dimanĉon, kaj nun belega virkoko el stanita fero indikis la kvar ventojn al bravuloj de la vilaĝo. Interne, ĉio estis bonorda. La plafono farita el lignaj tegotabuloj volbe najlitaj estis grize farbita ; la ĉefaltaro estis ĝuste lokita, ĉe la absido, kun ĉiuj kandelabroj kaj aliaj necesaj akcesoraĵoj. Iom antaŭe, la sonorilfandistoj de Orsarie, en Nailhac, faris sian laboraĵon ĉe la piedo mem de la sonorilejo, laŭkutime, kaj per la fama « kaprino », la sonorileto, pezanta nur du kvintalojn, la povrulino ! estis suprenportita kaj lokita en sia ĝusta loko.

Nur restis konsekri la novan preĝejon, kaj instali la pastron. Sed antaŭe necesis elekti lin, kaj pro tio la tuta popolo de la paroko ariĝis en La Noaillette, la dimanĉon de Kristnasko.

Kiel prognozis siro Joffre, la kleriko Guynefort estis senpene elektita, kaj kelkaj malriĉaj klerikoj, ambiciantaj beneficon, kiuj enviis la postenon, elreviĝintaj rehejmeniris. La pilgrimanto tamen ne ricevis unuaniman voĉdonon de la famiĉestroj. Iu Mondissou, el Clédier-de-Villemur, transpasis senhezite maldekstren, kiam la nomo de Guynefort estis anoncita. Tia estis la tiama maniero voĉdoni : « ne », ĉar, kompreneble, en tiuj tempoj, la voĉdoniloj kaj la urnoj el abioligno ankoraŭ ne estis inventitaj.

Demandite de la eskviro pri la kialo, kiu maldekstren movis lin, Mondissou senhezite respondis, ke li edziniĝis je la lasta karnavalo kun juna virino pimpa kaj vigla, kiu estas allogata de la pilgrimanto ekde lia alveno en la paroko, kaj tio fortege malplaĉas al li, konsidere ke li havas nenium inklinon por la virinoj « konsekritaj », tio estas ricevantaj la « favorojn » de la vivanta Dio, kaj pro tio li dezirus vidi Guynefort-on parokestro en tute alia loko ol en La Noaillette.

Sed la maljuna Quailer, de Charlie, profesie kanabo-tilisto, kaj dekanano de la parokaj administrantoj, aŭdante tion, trafe replikis al la ĵaluzulo, ke la plejaĝuloj de la paroko prizorgis la aferon. Kaj fakte, tiam kvar aŭ kvin patriarkaj bonuloj antaŭeniris al la nova parokestro, kaj, tre respektive, klarigis al li, ke la parokanoj forte deziras, ke ilia preposto havu, laŭ la antikva kutimo, pastrinon, aŭ sakristianinon, aŭ servistinon, same kiel la parokestroj de Bonneguise, Nailhac, Saint-Agnan kaj aliuloj en la najbarejo ; kaj tio, cele nur al tio, ke li ne cedu al la tento krakmanĝi la beletajn ŝafinojn metitajn sub lian protektadon.

- Vi ofendis min per tio, miaj amikoj ! – respondis Guynefort; – tamen, mi konsentas tiun humiligon pente de miaj pekoj.
Estu certaj, ke antaŭ mia ekokupo de la pastrejo, vi estos kontentigitaj.

La morgaŭon, la elektita bona parokestro foriris al Perigozo, rajde sur eta hino disponigita de la eskviro Joffre. Lia vojaĝo celis obteni la laŭkanonan investadon de

la parokestrado de La Noaillette. La tiama episkopo estis Pierre de Saint Astier; sed, hazarde, kiam Guynefort prezentiĝis en la episkopa palaco, la dirita sinjoro estis foririnta peli perdrikojn, kun siaj ĉasbirdoj, en la valo de la rivero Isle, ĉe unu el siaj nobelaj parencoj. Dum lia foresto, estis la ĝenerala vikario, kiu, ĉe prezento de la protokolo de la elektado, kaj de la atestoj de pastreco liveritaj de la episkopo de Saint-Flour, regule kontrolitaj kaj sigelitaj, konfirmis Guynefort-on en la posedo de la parokestrado de La Noaillette. Samtempe, la supre citita vikario komisiis, por konsekri la preĝejon kaj instalii la novan parokestron, la tre respektindan moŝton Jacques de Glenadel, abaton de Tourtoirac.

De Perigozo, Guynefort revenis al Joffrenie, kie li nur tranoktis. La morgaŭon li vojiris plu por ekserĉi pastrinon, kaj tiel plenumi sian promeson faritan al la bravuloj de La Noaillette.

Kelkajn tagojn pli malfrue, li revenis, alkondukante kun si pedelinon plezurige junan kaj beletan.

Kie tiu elturniĝema Guynefort elnestigis tiun dolĉan birdeton ? En malalta Limoĝio tute certe, ĉar neniam pli eleganta kufo kapvestis pli gracian estaĵon, de Ayen ĝis Ségur! Belkorpa, kun sveltaj gamboj, kiajn havas ĉiu aŭtenta limoĝianino, kun oraj haroj, rozkolora buŝo en kiu vidiĝis beletaj, blankaj dentetoj, kaj kun ridemaj okuloj avelkoloraj, tiel estis Nikolnjo. Krome, ŝi havis malicetan mienon, kaj gracian irmanieron, kiu malantaŭ ŝi balancis ŝian mallongan jupon el fusteno ornamita per ĉevronaj strioj.

En nia tempo sen fido, malpiuloj kiel vi aŭ mi, trovus okazon klaĉi pri tiu afabla preĝejanino. Tiel ne faris la parokanoj de La Noaillette; ili male estis kontentegaj, kaj gratulis Guynefort-on, ke li varbis tiel delikate gracian kreitaĵon. Eĉ la ĵaluzulo Mondissou deklaris sin kontenta :

- Kun tiu pastrino, – li diris, – nia parokestro ne estos instigata al tento kuri post la kokinoj kaj la kokinetoj de la paroko.

Kvankam tiu aserto povus akcepti diversajn interpretojn, pro la naturo de la viro, – mi ne parolas pri la virino ! – kiu facile emas al la ŝanĝo kaj inklinas prefere al la pomoj de la najbaro, neniu protestis.

La tagon de la konsekrado de la malgranda preĝejo de La Noaillette, ĉiuj parokestroj de la ĉirkaŭaĵo, venintaj al la ceremonio, ŝtelrigardis la beletan limoĝianinon kaj gratulis sian kunfraton, kun iomete da envio. La maljuna abato de Tourtoirac, eĉ honoris ŝin per bedaŭra okulumo rememorante sian junecon. Sed la pastrinoj, kiuj akompanis siajn pastrojn, laŭ la kutimo, trovis al ŝi aspekton iomete multe tro impertinenta.

Post la konsekrado de la preĝejo, Guynefort estis starigita en la « libera, nuntempa kaj korpa posedo de la parokestrado de La Noaillette, kun ĉiuj rajtoj, censoj, rentoj, dismoj kaj aliaj enspezoj de tiu ĉi dependaj ». La respektinda moŝto Glenadel, prenante lin man' en mano, enkondukis lin en la preĝejon kaj enmanigis al li la ŝlosilon de la pordego.

Enirante, per la pendanta ŝnuro de la sonorilo, Guynefort sonigis tri batojn honore de la sankta Trinitato ; poste, plu kondukata de la sinjoro abato, li iris al la ĉefaltaro, kiun li kisis, post kio li faris sian preĝon al lia sankta Moŝto Petro kaj legis la hodiaŭan evangelion. Tion farinte, li laŭvice venis al la mantuŝado de la sanktaj vazoj, kaj fine, post aspergo kaj incensado al la klerikaro, al siro Joffre, al la vilaĝanoj, kaj post vizito al la baptofontoj, la posedpreno estis kompleta kaj plenumita. Protokolo estis farita pri la tutaĵo kaj subskribita de la ĉefaj ĉeestantoj.

Klaŭzo de la dirita protokolo kondiĉis, ke la parokestro donacu per vera donaco, sen ia ajn simonio, kaj por ĉiam, al la preĝejo de La Noaillette, la sanktan ĉeneron el la kateno de la princo de la apostoloj. Ricevinte la devotajn kisojn de ĉiuj fideluloj, la dirita ĉenero estis reenŝovita en kupran relikvujon, donacitan de siro Joffre kaj de lia sinjorina edzino.

Tute nature, la preĝejo estis konsekrita al Dio sub la nomo Sankta-Petro-en-ligiloj...

Tute ne necesas diri, ke fine de la duobla ceremonio oni abunde bankedis, kaj ke okazis notindaj drinkadoj. Kelkaj parokestroj ekleziule ebrietiĝis, kaj la respektinda moŝto Glenadel hejmeniris kun kardinalece purpura vizaĝo, tiom multe li drinkis da iu hipokraso , speciale preparita por la gorĝoj de frandemuloj.

- Sinjoro abato, ĉu mi verŝu al vi de tiu hipokraso ? mi plej zorge preparis ĝin, por via pastra Moŝto, – demandis per dolĉa voĉo Nikolnjo, kiu dediĉis sin ekskluzive en la servo al la abato dum la manĝo.
- Verŝu, mia knabino ! Verŝu dia Hebo! – diris la ulo, agrable tiklata de la kufa flugilo ĉe la kolo, kiam la afabla vinverŝantino kliniĝis por plenigi la abatan hanapon.

Antaŭ ol ekrajdi denove sian blankan mulinon, lia abata Moŝto Glenadel frapetis per la dorso de la fingroj la vangon de Nikolnjo.

- Egan dankon, mia filino, vi ĝojigis la okulojn de maljunulo ; Dio vin benu !

KVARA ĈAPITRO

En ĉiuj aferoj diaj kaj homaj, okazas kelkfoje ke post la unuaj entuziasmaj tempoj sekvas paŭzo kaj malfervoro. Tie ĉi, alvenis nenio tia. La paroko de La Noaillette povis aplombe aserti, ke ĝi posedas la plej pian kaj honestan sacerdotan paron, kiu ekzistas en la tuta arkipastrejo de Saint-Médard, kaj, eble, en la diocezo de Perigozo. La pedelino atentis plenumi sian servon. La preĝejo estis ĉiumatene zorge balaita ; la sankta oleo neniam mankis en la lampo de la sanktejo, la buretoj el stano brilis sur la kredenco, kaj la altaro ĉiam estis ornamita per sezonaj floroj. Koncerne la parokestron, tiu ekzakte plenumis ĉiujn siajn devojn, kaj li faris tion kun ekzempla pieco. Ekde kiam li respondecis pri animoj, li mienis serioze, kiel iu, kiu konscias la tutan ŝarĝon de la terura responseco, kiu pezas sur lia kapo.

Li ne imitis la plejmulton el siaj kunfratoj, kiuj ĉasas, ludas per ĵetkuboj, drinkas inter ili kun siaj pastrinoj, kaj haste forpreĝas sian meson en eta kvaronhoro forglutante la duonon de la liturgiaj paroloj. Estis vere edifa afero vidi lin diservi, pia kaj enpensiĝinta, dum la pedelino servis lin kun mallevitaj okuloj, humila, serioza, kaj supreniris la ŝtupojn de la altaro aŭ facilpaŝe glitis sur la slaboj, kvazaŭ anĝelo de la paradizo.

Dum la semajno, malmulte da homoj estis edificataj ; estis en la preĝejo nur maljuna kriplulo, devige devotema, kiu havis plezuron vidi la ĉarman Nikolnjon servi ĉe la altaro. Sed dimanĉe, ĉiuj parokanoj estis tie, kaj plezuriĝis aŭdante meson kaj vesprojn diritajn kun tiom da pia fervoro kaj religia digno. La parokestro havis profundan kaj vibrantan voĉon, kaj estis agrabla afero aŭdi lin kanti la versiklojn de la vesproj, alterne kun la dolĉa kaj miela voĉo de Nikolnjo. La povrulineto ne scipovis legi, kaj ŝi devis parkeri ĉiujn diservajn respondojn. Kelkfoje ŝi ja fuŝparolis la latinajn vortojn, sed la ĉeestantaj bravuloj tute ne kapablis ekrimarki tion.

La dimanĉaj predikoj de Guynefort estis simplaj, sed bone taŭgis por la intelekta nivelo de liaj parokanoj. La bonega viro, por esti - laŭ la precepto de la Apostolo - al ĉiuj komprenebla, predikis en loka dialekto, ĉar neniu el liaj parokanoj, krom tiuj de Joffrenie, kapablis kompreni la tiaman francan lingvon, ankaŭ ne la latinan.

Pri la diversaj funkcioj de lia ofico, estis nur gratuloj por diri. Malsevera en la konfesejo, konsola ĉelite de la malsanuloj, gaja dum la geedziĝoj, malĝoja dum la entombigoj, krome, male de siaj kunfratoj, li estis neprofitema. Li neniam postulis, ke la fideluloj pagu al li, je Pasko, por ricevi la sakramentojn, kiel tiam kutimis. Kiam unu el liaj parokanoj forpasis, li iris por la forpreno de la korpo ĝis la mortula domo, kiom ajn malproksima ĝis estis. Kaj, vere, se vi estus vidinta la vojojn al Fornial kaj al La Charlie, antaŭ nur kvindek jaroj, kiel mi vi dirus, ke li estis merita.

Kaj krome, necesas aldoni tion : egale ĉu temis pri baptoj, geedziĝoj, entombigoj kaj aliaj parokestraj funkcioj, li senpage faris ĉion, por la amo al Dio. Kaj krome kompatema kiel la bona Samariano.

Estintus bedaŭrinde, ke li, pro tio, suferus domaĝon, tiu digna viro ; estintus mallogi vin bonfari. Cetere li ne suferis, danke al Dio, ĉar la mondonacoj kaj oferoj de la dankemaj parokanoj alfluis al la presbitera domo.

Ekde la unuaj tempoj de lia ofico, favorega opinio formiĝis en la parokejo koncerne Guynafort-on : oni amis lin pro lia bonkoreco, oni estimis lin pro lia saĝeco, kaj oni respektis lin pro lia virto. Sed la respekto fariĝis respektego, kiam oni eksciis de sinjorino Sybille, ke li ĉiunokte donis al si skurĝadon. Scivolemaj klaĉulinoj pridemandis Nikolnjon, kiu konfirmis la dirojn de la nobla edzino de la sinjoro Joffrenie. Je la dua matutina horo, kiam kantis la ruĝa virkoko de la pastrejo, la najbaroj kelkfoje aŭdis la bruon de obtuzaj batoj akompanataj de mallongaj ĝemoj ; estis la bona parokestro, kiu maceris sin draŝe frapante sur la sakojn da tritiko de la dismo, vicigitaj en lia koridoro.

Iom post iom, la bruoj de la meritoj de Guynafort disvastiĝis ekstere de lia parokejo. Unue, el ĉiuj proksimaj parokoj, kaj poste el tiuj de najbaraj distriktoj, oni venis al la patrona festo de Sankta-Petro-en-ligiloj, kiun li iniciatis en sia preĝejo, kaj kiu okazis la unuan de la monato de la imperiestro Aŭgusto, kiu postlasis al ĝi sian nomon. En tiu solena tago, la sankta ĉenero estis eltirita el sia relikvujo, kaj la parokestro malŝparis siajn fortojn por kisigi ĝin per la amasvenintaj devotuloj, kiuj fidis, ke tiu sankta feraĵo transigos al ili sian forton. Esceptokaze, tiun ĉi tagon, supujo estis lokita tute proksime, en kiun nur la fremduloj demetis sian monoferon, ĉar la indiĝenoj de La Noaillette estis senpage akceptataj por la ĉenero-kiso. En tiu sankta kaj fruktodona tago, la bonega parokestro kolektadis abundon da nigraj denaroj, kaj eĉ sufiĉe da blankaj denaroj, el arĝento. La damo kastelmastrino de Hautefort, alveninte sur sia ambloĉevalino, la unua kisis la sanktan relikvon, kompreneble, kaj ŝi lasis fali en la supujon oran « ŝafidon », tiam tute novan moneron, stampitan laŭ ordono de la sankta reĝo Luizo la Naŭa.

Kelkfoje estis mizeruloj, vilaĝanoj kaj neservutaj kampuloj, kiuj, havante eĉ ne unu nigran denaron, alportis naturan donacon : kokinojn, anasojn, leporojn, kuniklojn, kiujn la parokestro bonvole akceptis, por ne malgajigi tiujn suferantajn adeptojn de Jesuo Kristo.

En tiu sezono komence de aŭgusto, najbara al la hundotagoj, malmultas la maturaj fruktoj, kio estas maloportuna por patrona festo. La homoj de Bonneguise kiuj, ĉe sia festo de la Sankta-Klodovaldo, havis multe da diversaj persikoj tiuokaze mokis tiujn de La Noaillette. Por ŝanĝi tion, la parokestro venigis el Angoisse (Angoro), apud La Noaille, plantidojn de tiuj famaj piroj, kiuj, pro ilia akreco, donis, laŭ iuj, sian nomon al la buŝoŝtopilo de la iamaj kondamnitaj, la tiel nomata « piro de angoro ». La planto bonege kreskis en la ruĝaj teroj de la parokejo, kaj tiuj piroj, iam

tiel misfamigitaj, kuiritaj en maljuna vino kun grajno de koriandro kaj de fenkolo, laŭ recepto reportita el Jerusalemo de Guynefort, iĝis sanktaj kaj delicaj kompotoj. Ilia fameco fariĝis tia, ke la kutimo havi kuiritajn pirojn dum la popola festo de la unua de aŭgusto pludaŭris en La Noaillette ĝis nia epoko. Tamen, ĉar kun la tempopaso ĉio degeneras, la recepto de la bona parokestro perdiĝis, same kiel la speco de la piroj de Angoisse. Por sia patrona festo la homoj nun kuiras en akvo aĉajn pirojn de la Sankta-Johano.

La Dia beno al la paroko La Noaillette estis tiel videbla ekde kiam ĝi havis tiun parokestron, ke la sinjoro de Hautefort donis kiel verajn donacojn al la sankta viro, beletan amblantan mulinon, kaj, por nutri ĝin, herbejon ĉe la bordo de la rivereto Beuse. Krome, baldaŭ la komunumo estis sufiĉe riĉa por aĉeti novan sonorilon por doni pli da soleneco al la festoj. Tiu sonorilo vere ne estis dika, kaj ĝi kaj la alia ambaŭ pezis nur tri kvintalojn, kiel tio aperas el la inventaro de la sonoriloj de la kasteldistrikto, farita en 1530 de la sinjoro Jean d'Hautefort, laŭ la ordono de la reĝo ; sed la paroko ne estis granda.

Tiu prospero de la paroko La Noaillette, kaj ĉefe la famkonateco kaj reputacio de la parokestro Guynefort, ekscitis la ĵaluzon de la aliaj ĉirkaŭaj parokestroj. La vivdaŭra vikario de Nailhac, lia plej proksima najbaro, oftege uzis sian malicetan vervon atake al sia kunfrato, kaj klaĉis pri la beleta Nikolnjo, malŝatata de la pastrinoj, ŝiaj kunfratinoj, por la plejparte iom rancaj. Sed la plej fanatika el tiuj pastroj, estis la prioro de Saint-Agnan, malgranda rufa viro, galhumora, malica kaj avara, kiu rigardis la donacojn de la kastelestro, juĝista sinjoro de lia paroko, faritajn al Guynefort, kiel ŝtelon faritan al li mem, kaj, pro tio, ĉiuokaze akre mallaŭdis lin.

La bonega parokestro ne atentis la dirojn, plu edifis siajn parokanojn, kaj iafoje konfuzis siajn kritikantojn.

En iu kalenda tago, li vespermanĝis ĉe sia kunfrato de Bonneguise kune kun aliaj parokestroj, kaj interalie kun la prioro de Saint-Agnan, kiu pafadis al sia malfeliĉa kunfrato per la ŝiraj sagoj de siaj epigramoj, kiel arkisto pafanta al bela miskreska juglandarbo.

Guynefort sin retenis, kaj kontentiĝis modeste respondi kiam tiuj atakoj vere estis tro akraj. For ke tiu modereco kvietigus la ardan prioron, tute male ĝi forte ekscitis lin, des pli ke li malplenigis tiom multe da flakonetoj, ke li troviĝis per almenaŭ unu piedo en la vitejoj de la Sinjoro, alivorte, li estis ebrieta.

- « Jen vidu, sankta viro ! – incitegita li diris al Guynefort – jen muŝo mortinta, droninta en tiu vazo ; estas nur malgravega besteto, kial vi ne revivigas ĝin ? »

- « Ne estas pli facile revenigi la vivon en akareton ol en ĝirafon, milde respondis Guynefort ; – tamen, kun la helpo de Dio, mi provos ».

Post tio, ĉiuj parokestroj rideksplodis kaj tintigis la glasojn je lia sano,

opiniante, ke li freneziĝis. Li, ne konfuziĝante, prenis iom da salo fajne pistita el la salpistujo, faris el ĝi etan amason sur la tablotuko, ĉe la suno, metis la muŝon sur ĝin, surŝutis la muŝon per alia pinĉopreno da salo, kovris la tuton per sia pokaleta el filika vitro kaj diris al siaj kunfratoj :

-« Per tiu salo, simbolo de la forto, la Sinjoro manifestos se tio plaĉos al Li sian senliman potencon, redonante la vivon al tiu muŝo.

Pasis momento, dum kiu la parokestroj mokis Guynefort-on ; poste la muŝo movis unu kruron, du krurojn, restariĝis sur siaj piedoj, unue malrapide marŝis, glatigis siajn flugilojn, kaj poste, bone sekiginte sin, ĝi akcelis sian paŝadon kaj ĉirkaŭiris sian travideblan karceron.

Tiam la subtila Guynefort levis sian glason, kaj la muŝo forflugis antaŭ la mirantaj okuloj de la ĉeestantoj, kiuj restis gapantaj.

KVINA ĈAPITRO

Tiu revivigo, baldaŭ sciata en la tuta lando, aparte kreskigis la virtan reputacion de Guynefort. Sed malgraŭ tio, la ĵaluza envio tute ne ĉesis, tiel ke la malfeliĉa parokestro iom poste iris en granda akuzado al la eklezia juĝejo de Perigozo, kie li estis denunciata de la prioro de Saint-Agnan, kiel sorĉisto kaj magiisto. En tio kuŝis pli da motivoj ol oni bezonis por turmente malrapide rostigi lin. Feliĉe, la respektinda pastro Glenadel, komisiita enketi de sinjoro la eklezia juĝisto, sukcesis malproksimigi la ŝtiparon for de la kuloto de la bona parokestro.

Tiu, tute indulge, eltenis la ĉikanaĵojn kaj la persekutadojn. Tamen, kelkfoje, li perdis sian paciencon, kiel estis okazinte al grandaj sanktuloj, ekzemple al Simon Barjone, jam citita, kiu, per frapo de sia granda ambaŭtranĉa spado, tranĉis la dekstran orelon de servisto de la ĉefpastro, nomata Malchus, kiu postlasis sian nomon al tiuj tranĉilegoj antaŭlonge uzitaj, kaj ankaŭ al malnovaj konfesejoj havantaj nur unu orelon, tio estas, ununuran giĉeton.

La bona Guynefort, kun moroj pli pacemaj ol tiuj de sankta Petro, ne tranĉis la orelojn de la prioro, li kontentiĝis admoni lin iom forte. Iun tagon, kiam li revenis el Tourtoirac, kie li iris danki pastron Glenadel pro la bona servo, kiun tiu faris al li, li precize renkontis sian kontraŭulon sur la malnova vojo, kiu malsupreniras norde de la monteto de Hautefort, en la direkto al Saint-Agnan. Krepuskiĝis ; neniue en la ĉirkaŭaĵo. Guynefort komencis vangofrapi sian denunciinton sur la du vangojn ; poste ekkaptante lin per unu mano ĉe la kolumo de lia sutano, kaj per la alia ĉe la fundo de la kuloto, li forsendis lin super la heĝon, en rubusejon, la kapon antaŭen, la kruojn ekaperantajn, kaj daŭrigis sian vojon, forlasante lin elturniĝi kiel li povis.

Alvenante hejmen, la parokestro trovis ulon de la Haubertie, kiu atendis lin ĉe la kameno, – en la « queyrio » kiel oni diras dialekte, – por peti, ke li proklamu en la sekvonta dimanĉo, la unuan edziĝanoncon de lia filino, kiu volis meti la jugon sur sian kolon – kiel li diris – tio estas edziniĝi.

« Antaŭ ĉio », – diris la gastigema Guynefort, tute gajigita de la draŝado, kiun li ĵus faris – « antaŭ ĉio konvenas vespermanĝi ; almetu pelveton Nikolnjo; vi, kunulo el Prat, sidiĝu tie ».

Manĝinte grandan telerplendon da grasa supo, kaj farinte, kiel sia gasto, perigordan trinkon, nome teleron da supo, ĝisrande replenigitan per vino en kvanto sufiĉa por dronigi anaseton, la parokestro enmemorigis la nomojn de la fianĉino kaj la edziĝonto, kaj ektranĉis kokinon, kies ventro estis plena da ovofarĉo.

Ĉe la fino de la vespermanĝo, la maljunulo de Prat, kiun aŭdacigis la boneco de la parokestro, kaj sendube ankaŭ lia vino, submetis al li sian embarason.

Li havis nur tute etan dometon, kie tutsimple ne eblis ĉetabligi du dekduojn da kuzinoj kaj amikoj invititaj por la geedziĝofesto ; krome, li ne havis la necesan vazaron, pladojn, telerojn, kulerojn, glasojn, por ĉiuj...

- Nikolnjo pruntedonos al vi la tutaĵon – interrompis Guynefort.

- Multan dankon al vi, sinjoro nia parokestro ; sed ankaŭ la loko mankas...

- Tiam, miaflanke, mi pruntos al vi mian grandan pastrejan ĉambron.

La maljunulo re kaj re esprimis siajn dankojn, kaj foriris manĝinte kaj drinkinte ĝissate, kaj kontenta kiel fringo.

La tagon de la geedziĝofesto, ili estis dudek kvin ĉetabliĝintaj en la ĉambro de la parokestrejo, abunde manĝante kaj drinkante. Koncerne la tradiciajn ŝercojn sufiĉe maldecajn, kiujn oni faras al la novgeedzoj en Perigordo, la gastoj estis iom briditaj pro la ĉeesto de la parokestro, kiu prezidis dum la manĝo, laŭ konveneco. Tamen la krurzono de la novedzino estis al ŝi ŝtelita, laŭ malnova kutimo, fare de knabo, kiu kaŝe enŝoviĝis sub la tablo. La gepatroj de la novedzino estis portintaj en la pastrejon ĉiujn siajn proviantojn, kaj respektindan nombron de tiuj grandaj pindoj da vino, el kiuj dek du konsistigas unu bareleton kaj dudek kvar, unu ŝarĝon.

Sed finfine, ili tiom drinkis, ke la manĝrestaĵoj estis sur la tablo preskaŭ elĉerpitaj, kiam Nikolnjo venis por diri al Guynefort :

- Restas al ili preskaŭ neniom da vino !

Li dummomente pensis, kaj poste, laŭtigante la voĉon, diris al la novgeedzoj kaj al iliaj nuptatestantoj :

- Prenu pindon kaj iru plenigi ĝin ĉe la fonto de Sankta-Petro.

Reveninte, la kvar gejunuloj metis la pindon plenan antaŭ la parokestro.

Guynefort rigardis ĝin unu minuton, kaj, kvazaŭ subite inspirita, prenis kaj metis ĝin en murŝrankon kun duobla fundo, kiu komunikiĝis kun alia en la kuirejo. Post tio li pie meditadis en mallonga fervora preĝo, dum Nikolnjo zorgis pri siaj okupoj aliaflanke.

Post momento, la bona parokestro ekstaris, levis la okulojn kaj la brakojn al la ĉielo figurata de la solivoj de la grenejo, grumbletis parolojn, kiujn neniu aŭdis, krom la vorto per kiu li finis sian alvokon : « Amen ! »

Kaj, remalfermante la murŝrankon meze de solena silento, kiu anstataŭis la bruan gajecon de la gastoj, Guynefort eltiris la pindon kaj metis ĝin antaŭ li sur la tablon. Poste, staranta, grava kaj serioza, li diris al la geedzoj :

- Prezentu vian pokaletan !

Kaj, ekprenante la pindon, dum, emociite, ĉiuj ceestantoj anxie kaj atente observis, kian likvaĵon eliros el la botelkolo, li ekverŝis...

- Miraklo ! Miraklo ! – ekkriis ĉiuj homoj de la nupto vidante klaran kaj ruĝegan vinon flui en la glason.

« Trinku »! – diris la parokestro al la geedzoj – « kaj tiu vino donu al vi la forton elporti la malfacilaĵojn de la vivo, kaj rezisti al la tentoj de la Diablo » !

Siavice, la parencoj kaj la gastoj enpenŝiĝe trinkis tiun miraklan vinon :

- Ĝi odoras frambon, diris unu.

- Tute ne ; ĝi odoras la floron de marto, replikis aliulo.

- Tamen, diris vespere Guynefort al Nikolnjo, necesus, ke tiaj nuptoj ne ofte okazu, se ne mia maljuna vino de Saint-Pantaly baldaŭ estus fortrinkita.

Tiu miraklo multege pli sukcesis ol la antaŭa. Revivigi muŝon, tio ne estas tre utila, nek agrabla, diris la pozitivaj homoj. Sed transmutacii akvon en frandan vinon, estas afero eminente delectanda, profita, kaj tiu, kiu havas tiun povon, estas sanktulo, kiun oni devas genue adori. Ne necesas diri, ke la bona parokestro estis insiste petita de kelkaj parokanoj – amatoroj de la bona septembra likvaĵo, alinome la vina tizano – refari tiun miraklon ; sed li malkonsentis, dirante ke oni ne devas tenti Dion.

La fonto, el kiu la akvo estis ĉerpita, akiris pro tio gravan famecon, ĉefe kiam baldaŭ poste, Guynefort resanigis infanon, malsana pro danĝera tifoida febro, danke al daŭraj mergadoj en ĉefonta baseno. Tiel la bona pastro estas la inventisto de la kuracado al la tifoido per malvarma akvo, eĉ se tio malplaĉas al homoj, kiuj opinias inventi dum ili nur imitas.

Sekve de tiu mirakla resaniĝo, la tieaj bonuloj estis iom post iom kondukitaj konsideri la akvon el tiu fonto, kiel posedantan efikon, ne nur kuracan, sed ankaŭ preventan. El ĉie la patrinoj alkuris, surbrake portante siajn infanetojn kaj mergis ilin en la sanigan akvon. Vidante tion, la pastro, ĉiam sagaca, konstruigis etan budon kaj enŝlosis la fonton. Ekde tiu momento, la homoj fremdaj al la paroko devis pagi unu denaron por uzi ĝin, sed la parokanoj trempis siajn infanojn senpage, danke al ruza politiko de Guynefort. Sed iom post iom, ĉe la paso de la tempo, avaraj parokestroj fine pagigis ankaŭ la parokanojn, kaj, pro la natura plikostiĝo de la aĵoj, multe kreskigis la prezon.

Dum la unua duono de tiu pasinta jarcento, kvin soldojn kostis mergo de la infanetoj en la akvon el la fonto, nun ĉirkaŭfermita en la tombejo ; kaj mi, kiu parolas al vi, mi estis trempita ĉi-enen de mia vartistino, je tiu prezo : – ve, antaŭ sesdek kvin jaroj !

Hodiaŭ necesas doni dek soldojn, kio estas multekosta por la malriĉuloj ; pro tio iam kaj iam oni vidas, en nia najbaraĵo, la patrinon de malsana etulo almozpeti kun tiu ĉi surbrake, por akiri la dek soldojn, postulatajn ne de la parokestro, ĉar ne plu estas pastroj nun , sed de la nepagata pedelo de la malgranda religia respubliko de La Noaillette.

Egale ĉu por pastro aŭ laiko, mondonaj institucioj estas konservindaj.

SESA ĈAPITRO

Dudeko da jaroj post sia alveno en La Noaillette, Guynefort plene ĝuis gravan reputacion pri sankteco, kiu radiis ĝis kelkaj leŝoj de tie. De la ĉirkaŭaĵoj de Genis, Saint-Robert, Villac, Condat, Azerat, Sainte-Yolée, Saint-Médard, Anhiac, la neservutaj kampuloj kaj servutuloj alligitaj al la plugtero, venis, plenfidaj, alporti siajn infanojn al la bona parokestro kiu mergis ilin en la bonefikan akvon dirante malgrandan oremuson, aŭ ja ankoraŭ, peti de li, pagante, kompreneble, meson cele al la prospero de la hejmanaro.

La tagon de la Sankta-Petro, estis tia popolamaso veninta kisi la sanktan ĉeneron, ke la vojoj, interkruciĝoj aŭ vojkruciĝoj kaj fruktarbejoj ĉirkaŭ la vilaĝo, aspektis kiel foirejo : tendoj ĉie estis starigitaj por disdoni nutraĵon al la pilgrimantoj kaj trinkiĝi ilin. En tiu benita tago, la loĝantoj vendis po poto kaj pindo sian malfortan acidetan vinon, feliĉaj forvendi ĝin por bona prezo, antaŭ ol ĝi refermentus.

Tiu ĉi tago, kiu riĉigis la parokon La Noaillette, ankaŭ prosperigis la parokestron. La nura salajro por la petitaj mesoj sufiĉis por nutri lin kun Nikolnjo dum la tuta jaro, kaj plie ebligis, ke li montriĝis larĝe gastigema al iu ajn, kiu venis al la parokestrejo. Kaj krome la bonkoraj patrinoj, kies infanoj estis resanigitaj de Guynefort, ne montris sin nedankemaj, kaj faris al li kamparajn donacojn. Li ricevis tiom multe da kokinoj tiuokaze, ke li sendis ilin por vendo la postan ĵaŭdon en la bazaro de Excideuil, kio malaltigis la prezojn, tiun tagon, sur la placo de la Ŝnuristoj.

En la paroको, aŭdiĝis ununura krio : kia sankta viro ! tiel pia, tiel helpema, tiel mizerikorda, tiel severmora ! kiu sin vergas po tri fojoj semajne, kvazaŭ li tion bezonus ! kaj kiu elpetas eĉ ne unu denaron de siaj parokanoj, kio estas unikaĵo en la kristanaro!

Tio komenciĝis danke al reputacio de feliĉodonanto, nome oni kredis, ke li « havigis bonŝancon ». La najbaroj estis feliĉaj renkonti lin forirante al la foiro, persvaditaj ke ili bone vendos sian porkon. Ĉiuj ankaŭ rimarkis ke, de kiam li gvidis la procesiojn de Rogacio, ne plu hajlis en la paroको ; kaj ankoraŭ, ke ĉiuj geedzoj kies liton li benis, laŭ la kutimo, produktis idaron kiel en la feinrakontoj, aŭ kiel en la kunikla gareno de Joffrenie.

Tial, dimanĉe, la virinoj metis sin kiel eble plej proksime al lia paso, kiam li eniris en la preĝejon, por esti flugtuŝitaj de lia robo, kaj tiel profiti de lia feliĉodono. Poste, ĉar – en La Noaillette ! – ili estis iomete trudiĝemaj, ili aŭdacis tuŝi lian surplison kiam li diservis, aŭ lian manskribitan brevieron forgesitan sur la ĥorejbalustrado. Poste, ĉar plu kreskis lia reputacio pri sankteco, ili eĉ finfine tranĉis kelkajn pecojn de lia vestaĵo, kaj enviis lian kratagan bastonon.

La edzino de la senjoria juĝisto de Hautefort, kiu estis aŭdaca matrono, eĉ

kuraĝis, iun tagon dum li preĝis, detondi buklon de liaj nigraj haroj miksitaj kun kelkaj blankaj fadenoj. La bona parokestro ŝajnis ne rimarki tion, por ne esti devigata koleri kontraŭ ŝi, sed de tiam, li sin kovris la kapon per kapuĉo, por ŝirmi sin de tiuj piaz ŝteletoj.

En La Noaillette kaj en la ĉirkaŭaj najbaraj vilaĝoj, ĉiuj unuanime gloris la virtojn de la parokestro Guynafort. Liaj kunfratoj el la ĉirkaŭaĵo, kvankam ĵaluzaj, ĉesigis siajn atakojn antaŭ la universala kultado de la fideluloj, kaj neniu misharmonia voĉo aŭdiĝis por protesti. Estas eble neĝuste diri : neniu. La prioro de Saint-Agnan, konstanta malamiko de Guynafort, estis mortinta pro atako de subpremita galo, sed la parokestro-preposto de Saint-Raphaël transprenis lian rolon. Ne ĵaluzo pri la sankteca reputacio de lia kunfrato de La Noaillette turmentis lin, sed intereso pure materia. La sankta ĉenero de la princo de la apostoloj noce konkurencis la tombon de sankta Remo, kiu estis, kaj ankoraŭ estas, en la preĝejo de Saint-Raphaël. Ekde kiam Guynafort imagis trempi la etajn infanojn en la tombejfonton, oni ne portis ilin kiel en la pasintaj tempoj sur la tombon de la ĉefepiskopo de Reims, kiu estis enterigita, oni ne scias kial, en fora kantono de nia Perigordo. La maljunaj personoj, viroj kaj virinoj, fojfoje iris rajdi lian tomboŝtonon ; sed se ĉion kalkuli la klientaro de la tiel nomata sankta Remo estis multe reduktita ; pro tio koleris la preposto de Saint-Raphaël, viro praktikema kaj sperta pri la negocoj de tiu malfortika tera mondo.

Sed liaj kriaĉoj perdiĝis en la koncerto de la fideluloj, kiuj prikantis Guynaforton, tiamaniere ke li predikis en la dezerto : « Vox clamantis in deserto », kiel diras Johano-Baptisto, kaj kiel diris Guynafort mem mokante sian kunfraton kune kun Nikolnjo.

Tiu bonegulo do estis en kiel eble plej bona situacio ; adorata de siaj parokanoj, respektigata de ĉiuj, li estis « matura por iri al ĉielo », kiel tre bone diris monaĥo de Châtres, kiu predikis Pasionon en La Noaillette en la jaro de Nia-Sinjoro 1273. Tamen lia ekstera aspekto ne anoncis la eventon, kiu poste forrabis lin de lia paroko por enkonduki lin en la «feliĉegaj valoj » laŭ alia esprimo de la supre citita monaĥo-predikisto. Lia vizaĝkoloro floradis, liaj okuloj estis vivecaj ; li havis fortikan stomakon, la krurojn firmajn, kaj ĉiutage li benis, kune kun Nikolnjo, la Sinjoron kiu gardis lin forta.

Sed la celoj de Dio estas nediveneblaj ; kontraŭ ĉia verŝajneco, katastrofo alvenis.

La postmorgaŭon de la festo de Ĉieliro, la sonorilisto, irante sonigi la anĝeluson, trovis en la preĝejo, ĉe la muro, ĝuste fronte al la altaro de la sanktuloj Come kaj Damien, la bastonon de la parokestro. Sed en kia stato, belega ! floranta same kiel en la tempo kiam ĝi estis vivanta heĝo de kratago, aŭ de « blanka vepro », kiel oni nomas ĝin en La Noaillette kaj eĉ aliloke.

Konfuzegita, la bonulo iris en la vilaĝon heroldi la novaĵon, kaj baldaŭ la alkurintaj loĝantoj povis konstati la miraklon.

Ĉar temis ja pri miraklo, eksterdube. La floranta bastono certe ja estis tiu de la parokestro Guynefort; tiu plektita rimeno estis ja tiu, kiun li ŝovis al si sur la manartikon, kaj la hufoferisto senhezite rekonis, la feran tenilringon per kiu li ekipis la dikan bastonpinton. Tuj la du sonoriloj ektondradis kaj diskonigis al la bonuloj de la paroko, ke io eksterordinara okazis en la vilaĝeto.

Tiam el ĉiuj flankoj alkuris la scivolemuloj, viroj, virinoj, infanoj, kun sinjoro Joffre ĉe la kapo de irantaro, ĉar li rajdis. Vidante la florantan bastonon ĉiuj ĝoje ekkriis, kaj benis Dion, ke tiu donis tiun signon al sia popolo de La Noaillette.

Sed Mondissou, el Clédier-de-Villemur, kiu estis kontraŭdirema, ĵetis iom da malvarma akvo sur tiun pian entuziasmon, rimarkigante ke la monaĥo komparis la odoron de la virtoj de ilia parokestro al tiu, kiu eliĝis el la kratagaj heĝoj dum la bela maja monato, kaj sekve tiu miraklo povis esti interpretita kiel malbonaŭgura antaŭsigno.

Tiam ekaperis Nikolnjo, spirmanka, kiu ĵus alportis, kompateme, supon al maljuna kaj malsana virino, loĝanta en la arbaro apud Les Rebières. Demandite pri tio, kie troviĝas la parokestro, kiun oni ne trovis ĉe li, la pedelino sciigis al la parokanoj, ke Guynefort foriris la antaŭtagon sur sia azeno, por preĝi kun la bonaj religiuloj de la abatejo de Dalon. Tion dirite, ŝi genuiĝis, kaj dankis la Sinjoron pro tio, ke li aperigis la meriton kaj la virtojn de la parokestro Guynefort.

Dum ĉiuj preĝis aŭ gratulis sin, oni aŭdis eksterajn voĉojn kiuj plore ekkriis. La parokestro revenis, sed en kia malgajiga sanstato! Sen konscio, inerta kaj subtenata de du laikaj fratoj de Dalon, sur lia azeno, kiun tria frato kondukis per la kaprimeno. Tiuj bonkoraj frokuloj rakontis al la popolamaso ke la « sankta parokestro » – kiel ili diris – havis « sangalfluon », alidire cerban hemoragion en la mateno mem ĉe eliro de la tablo, en la momento de la dankopreĝo.

Transportita en sian liton, Guynefort forpasis ĉe la sunsubiro, malgraŭ la zorgoj de pluraj bonulinoj, el kiuj ĉiu havis sian nepre efikan kuracilon, kaj la larmoj de la malfeliĉa Nikolnjo, kiu iom perdis la kapon. Li mortis sen konfeso, ĉar neniu havis la ideon venigi pastron por tiel sankta viro.

Kaj post kiam li eliĝis la lastan spiron, ĉiuj rememoris la vortojn de Mondissou, kiu tiel akiris belan reputacion de saĝeco.

La enterigo de la bona parokestro altiris grandegan popolamason en La Noaillette, kaj ĉiuj ĉeestantoj venis laŭ senfina vico tuŝi la ĉerkon lokitan antaŭ la ĥorejo sur funebra portilo. La parokestro de Lachapelle-Saint-Jean, ruza kaj malfortika viro, kiu avidis la postenon de la forpasinto, propravole sin proponis por eldiri lian funebran paroladon. Li estis favore akceptita de la parokanoj, ĉar li estis kleriko tiel parollerta, ke oni diris pri li, ke la matrono-akuŝistino, kiu senbridigis lian langon ja meritis la ricevitan kvin-denaran pagon.

Tiu parokestro do laŭdegis la virtojn de Guynefort, kaj rememorigis tiun kortuŝan trajton pri lia humileco, ke li estis interŝanĝinta kontraŭ azeno, sian beletan mulinon, donacon de la kastelestro, ne plu volante rajdi ĝin ĉar lia dia Majstro siatempe kontentiĝis per posedo de azenino. Poste asertinte, ke oni neniam anstataŭigos tiun sanktan pastron, la perfidulo ekkriis, hipokrite ŝtelrigardante Nikolnjon:

– Estos feliĉa tiu, kiu postvenos lin ! ...

Kaj fakte li estis prava. Se la pedelino ne plu havis la talion flekseblan kaj la irmanieron flughavan de la juneco, ŝi plu estis freŝa kaj plaĉa. Ŝia agrabla persono estis pli karnoriĉa, pli graspujeta, kaj do plej alloga por tenti kvardek-okjaran grizulon, kiel estis la parokestro de Lachapelle, kiu tre volonte kunuliĝus al ŝi eĉ dum siaj dimanĉoj kaj festoj.

Kiam la oratoro, alveninte al la fino de sia parolado, suprenlevis la brakojn kaj montris, per inspirita gesto, Guynefort-on enkondukitan en paradizo kaj figurantan inter la sanktuloj, okazis eksplodo da entuziasmo, kaj la tuta ĉeestantaro ekkris per komuna voĉo :

Li estas sanktulo !

Al kio la predikanto aŭdace respondis, ke Dio parolis per la voĉo de la popolo de La Noaillette.

Se li estus sciinta la latinan, li estus dirinta, same kiel Guynefort okaze de lia elekto al la parokestrado : « Vox populi, vox Dei » ; sed li estis kiel mi kaj kiel multe da siatempaj parokestroj, li ne sciis vorton pri ĝi.

Tiel estis kanonizita, haste kiel tiom da aliaj sanktuloj de vilaĝo, sen paperaĵoj, sen debatoj, sen kontraŭstaro nek advokato de la diablo, per unuvoĉa decido de la parokanoj, la bona parokestro Guynefort. En tiu tempo, la homoj kvankam iom stultaj, ne estis stultaj ĝis tiu punkto, ke ili donus grandegajn sumojn por enskribigi bravulon en la novaj almanakoj. Kie diable la bonanimaj homoj de La Noaillette estus prenintaj la sepdek mil romanajn eskudojn, – ĉirkaŭ tricent kvindek mil frankojn, vi bone aŭdis ! – nome tiom, kiom kostis la kanonizo de sankta Francisko el Paola ? aŭ eĉ nur la plurajn centojn da mil frankoj pagitaj en nia tempo al sinjoro apostolo de Romo, Mastai, la papo Pio la naŭa, kaj al liaj antaŭuloj, por tiu de la pedikoplana Labre ? La tuta parokejo ne valoris tiom !

Post la aspergadoj kaj la laŭritaj incensadoj, la ĉerko de la forpasinto estis malsuprenigita en tombon fositan ĉe la interna muro de la preĝejo, precize en la loko kie estis trovita lia bastono de floranta kratago. Sur la ŝtono kiu kovris la tombon, la parokanoj igis senprokraste starigi altaron honore al li, kaj aldonis ekde tiam al la litanioj de la sanktuloj tiun gloran alpreĝon :

***Sankta Guynefort
Por la vivo kaj la mort' !***

SEPA ĈAPITRO

Supre, la aferoj ne iris tiel glate. La bona Guynefort vestita, mi ne scias kial, per sia morta formo, pene grimpis supren laŭ pado, kruta, ŝtonhava, malfacila, sur kies randoj kreskis rubusoj kaj dornarbetoj, kiun vojmontra fosto nomis « Mallarĝa Vojo ». La ŝtonoj ruladis sub liaj piedoj, la rubusoj skrapetis al li la manojn, li ŝvitis, li spiregis, elŝovis la langon, kaj de tempo al tempo haltis por reakiri la spiron.

« Ŝajnas al mi, – li diris al si tiam, – ke mi estas sur la pado de Charreyrou, kiu suriras de la vadejo Gonthier al vilaĝego Hautefort. Se nur mi havus mian marŝbastonon, kiun Nikolnjo bruligis antaŭ kelkaj tagoj, por anstataŭigi ĝin per alia freŝdate hakita en la floranta heĝo de nia ĉirkaŭbaritejo, mi povus pli pacience atendi la finon ! »

Kaj, paŭze reakirinte sian spiron, Guynefort plu suprengrimis la krutan montaron. Ĉirkaŭ tagmeze li alvenis al la pinto de tiu ĉi kaj vidis esplanadon ĉirkaŭitan de granda konstruaĵo simila al klostro, kien li eniris kiel azeno en muelejon.

Li estis en speco de vestiblo, en atendejo vasta kaj dezerta, kun aĉastilaj pilieroj subportantaj korbansan volbon. Fronte al li estis giĉeto, kie li iris frapi farinte en si tiun pripenson :

« Oni ne estas ĝenata, ĉi-ene ! »

La giĉeto senprokraste malfermiĝis kaj gracia kerubo kun rozkoloraj vangoj, kun blondaj kaj bukraj haroj, provizita sur la skapoloj per bela paro da blankaj flugiloj, ĝentile demandis al li :

- Kiel mi povas helpi al vi ?

- Mi volus eniri en la paradizon.

- Oni ne povas senpere eniri ĝin..., iom atendu. Sankta Petro iris al raportkunveno, li revenos baldaŭ.

Atendante la ĉielan pordiston, Guynefort ekzamenis la registrejon de la restadejo de la beatuloj. Estis granda desupre lumigita ĉambro, kies muroj estis kaŝitaj de nenombreblaj registroj vicigitaj sur bretaro. Antaŭ skribotabloj el nigriĝinta ligno, sidis etaj anĝeloj, kiuj ŝajnis tre diligentaj je siaj skribaĵoj. En la fundo, malfermiĝis monumenta pordo rigardante al la loĝejo de la elektitoj. La taktaro de muziko el foira teatro aŭdiĝis el trans la pordo.

- Ĉu hodiaŭ vi havas koncerton ? – demandis Guynefort al la kerubo, kiu deĵoris ĉe la giĉeto.

- Nu ! koncerton... se oni povas tiel diri. Davido kaj Cecilio varbaĉis kelkajn muzikistaĉojn por organizi orkestron, kaj ili provlude trejnas ilin.

En tiu momento la pordo malfermiĝis, kaj, en abundo da lumo, Guynefort ekvidis grandegajn vicojn da eminentuloj, kapvestitaj per aŭreolo, vestitaj per

splendaj vestaĵoj kaj sidantaj sur oritaj foteloj, kiuj oscedis kiel ostroj.

- Kiom da episkopoj ! – li ekkris.

- Episkopoj? – diris la eta kerubo kun rideto; ni ne havas tiom da ili, kiom vi opinias !

Tamen, sankta Petro, ĉar estis li, kiu malfermis la pordon, refermis ĝin, kaj rekte venis al la giĉeto :

- Kiu vi estas ? li demandis kun dorna mieno.

- Petro Guynefort, kvankam ne inda je tiu ofico, parokestro de La Noaillette, en la lando Perigordo.

- Kaj vi volas eniri...kiel ĉiuj aliaj, ĉu ne ?

- Jes, se tio eblus.

- Kion vi faris por tio ?

- Sankta Patrono, mi dediĉigis al vi la preĝejon de La Noaillette, kaj mi metis vian kulton en granda honoro en la tuta lando, danke al ĉenero de la kateno, per kiu vi estis ŝargita laŭ la ordono de la kruela reĝo Herodo...

- Vi estas ŝerculo, viro, – intermetis sankta Petro kuntirante siajn densajn brovojn ; – la reĝo neniam enkarcerigis min.

- Tamen tio estas skribita en la Agoj de la apostoloj.

- Luko revis kiam li skribis tion !...Kyriel, etulo mia – aldonis la pordisto de la ĉielo alparolante unu el la anĝeletoj, – sobigu por mi la Libregon de Perigordo, kie situas tiu fama paroko de La Noaillette.

La eta skribisto movis siajn flugilojn kaj supreniris ĝis la plej alta breto, kie li prenis dikan registron kun kupraj anguloj, kaj malsupreniris kaj metis ĝin sur altan pupitron antaŭ sankta Petro.

- Vi, eta senkapulo ! – tiu ĉi diris iomete pinĉante la oreton de la anĝelo, – tiu registro estas tiu de la nigra Perigordo. La Noaillette estas sur la blanka Perigordo...kaj en ruĝa tero...

La kerubo resupreniris kaj sobigis alian registron, kiun sankta Petro tuj foliumis.

- Tiu tabelo ne estas ĝisdatigita, etulo ! Mi devos puni vin per malpermeso promeni !

- Sed, sankta Petro, vi serĉas ĉe la litero No ! Vidu ĉe la litero Lo ; la artikolo apartenas al la nomo.

- He ! he ! povas esti, ke vi estas prava...Ni vidu iom: La Bachellerie, La Boissière-d'Ans, Ladouze...La Noaillette.... Jen al la kerno alvenas ni !

Kaj sankta Petro atente eklegis. Baldaŭ li montris signojn de senpacienco, kaj, bruske alparolante Guynefort-on :

- Kion do vi fabelis al mi antaŭ momento pri via malindeco ? Vi estas kanonizita tie for! Kaj ironie rideksplodante:

***Sankta Guynefort
Por la vivo kaj la mort' !***

- Estas miaj parokanoj, kiuj elpensis tion, – tute mallaŭte diris la forpasinta parokestro ; – mi estas nur malfeliĉa pekulo, tion mi ja tre bone scias, ve !

- Kiel do ! – ekkriis la ĉiela ŝlosilportisto svingante sian ŝlosilfaskon – : kial nomi vin malfeliĉa pekulo ? vi kiu dumvive faris miraklojn !

- Tiel etajn ! – flustris Guynefort.

- Revivigi muŝon ne estas bagatelo !...Kaj ankaŭ ŝanĝi akvon en vinon ! Estas miraklo, kiun Nia-Sinjoro mem volonte konsentis ĉe edziĝofesto en Kana Galilea...Fine, reflorigi vian bastonon, same kiel tiu de la lignolaboristo Jozefo !...Ĉio ĉi estas ne malatentinda...

- Mi faris tion cele al la plej granda gloro de Dio, – diris Guynefort iom pli laŭte.

- Mi kredas vin ! kaj cele al via propra profito.

- Ĉiu serĉas la sian, – diris la forpasinta parokestro, en kiu ekbolis kolero ; – vi sufiĉe intrigis por akiri la princecon en la kolegio de la apostoloj.

- Vi kredas tion, fia uzurpanto !

- Jes! Kaj vi, kiu arogas al vi riproĉi aliulojn, ĉu vi pensas ke oni ne konas vian tutan konduton kaj viajn opiniŝanĝojn? Memoru kiel Paŭlo najlis vian bekon muta en Antioĥio !

- Ha ! Vi estas partizano de Saulo, la bona amiko de Teklo ! – ekkriis Petro, furioza.

- Ja jes, Cefaso ! li estis viro alispeca ol vi !

Tiam la ĉiela ŝlosilportisto ironie rikanis, kaj Guynefort reparolis :

- Sume, mia kulpo estas malgrava. Mi trinkigis al bravuloj, kiuj neniam gustumis la saman, pindon de mia bona maljuna vino de Saint-Pantaly...

- Kaj malice mokis la miraklon de Nia-Sinjoro !

- Tio tamen estas preferinda al via trifoja forneo de li, Barjone !

- Foriru al la diablo !

Kaj sankta Petro, bruske fermante la giĉeton, preskaŭ gilotinis Guynefort-on. Feliĉe tiu rapide retroiris, kaj lia nazo, kiu iom elstariĝis el la alliniigo, sola estis iomete raspvundita.

Foriri diablen, bonege ; sed tamen necesas scii kie li loĝas.

- Fuŝa fiŝkaptisto kaj surlaga maristo, li ! – grumbletis Guynefort malsuprenirante, – kaj ĉu do li opinias, ke la purgatorio estas destinita por la hundoj!

OKA ĈAPITRO

Piede de la paradizmontaro, la bona parokestro troviĝis en grandega marĉa ebenaĵo, mallumigita de densa kaj malvarma nebulo. Longtempe li hazarde vagis tra la malsekaj profundaĵoj kaj la eglanteriaj veproj, kie kelkfoje flugetis vaglumoj. Fine li tute neatendite alvenis al la enirejo de vastega ĉirkaŭmuro fermita per peza najlkovrita pordego. Almetinte sian okulon al la seruro, Guynafort ekvidis nenombreblan amason da homoj, kiuj iris kaj reiris sencele kaj senorde, en glacia dezerto, sen unu arbo, sen unu herbero. Ĉiuj havis sur siaj palaj vizaĝoj tian esprimon de senemocia enuo, ke la parokestro diris al si mem :

« Tiuj ĉi homoj ŝajne tediĝas kiel mortintaj ratoj...Tamen, ni vidu iom ! »

Kaj li pugnofrapis du fortajn batojn : bat ! bat !

La pordo malfermiĝis, kaj speco de pordisto aŭ ĉef-gardisto, malbela, flavhaŭta kaj malafabla, demandis :

- Kion vi volas ?

- Iom eniri por vidi kiel oni estas ene.

- Ĉu vi havas malliberigobileton ?

- Ĉu estas do malliberejo, ĉi tie ?

- Sendube, ĉar estas la purgatorio...Necesas scii ĉu vi restos dudek-kvar horojn, aŭ centmil milionojn da miliardoj aŭ trilionoj da jaroj...via bileto indikos tion.

- Bileton mi ne havas.

- Do vi havas nenion por fari ĉi tie. Necesas, ke vi iru pli alten...aŭ pli malalten.

Tiam Guynafort sin sentis penetrata ĝis la visceroj de glacia malvarmo, kiu emanis el tiu malafabla purgatoria provoso.

- Brrr... – li faris – oni terure frostas, ĉi tie !

- Eble vi iros en lokon, kie tro varmos ! – rebatis la aliulo fermante la pordon.

La ekparokestro de La Noaillette foriris kaj denove trairis la ebenaĵon laŭ ĉiuj direktoj, serĉante lokon, kie oni bonvole akceptu lin.

Post horoj, alveninte ĉe interkruciĝo kie pluraj vojoj renkontiĝis, ne sciante kiun laŭiri, lacega, elĉerpita, li sidiĝis sur ŝtono. Dum li estis tie, sin demandante kie li loĝos, Guynafort ekvidis du nekonatojn kun mieno de honestuloj, kiuj atente konsideris lin, kaj poste konsultis siajn tabelojn.

Interŝanĝinte siajn impresojn, tiuj du uloj venis al li kaj, tre ĝentile, salutis lin :

- Vi ŝajnas fremda en tiuj lokoj ? – demandis unu el ili.

- Kaj serĉe al loĝejo, – aldonis la alia.

- Precize.

- Se vi konsentas ni gvidos vin.

- Volonte.

Kaj Guynefort sekvis la du nekonatojn.

Tute proksime de tie komenciĝis bela avenuo fajne sablita, borderita de ekzotaj arboj, kaj malkrute dekliva : sufiĉis nur sin allasi.

Survoje, la du gvidantoj inside alkondukis la vojaĝanton eldiri sian nomon :

- Pierre Guynefort, eksparokestro de La Noaillette.

- Ha ! Tre bone, – diris la du kompanoj interŝanĝante ekrigardon.

En iu loko, je la aleofino, malfermiĝis subtera enirejo. La du kunuloj ĝentile flankeniĝis, kaj, per voĉo kaj gesto, indikis :

- Ni iros post vi...

La vojeto enprofundiĝis sub la teron, ne ĉiam tre glatan. Estis specoj de naturaj ŝtuparoj, elstarajetoj de rokoj ; sed unu el la gvidantoj, kiu antaŭiris, serveme avertis Guynefort-on :

- Atentu ! ĉi tie estas malbona pasejo.

« Jen ĝentilegaj homoj – diris al si la forpasinto, – kaj tute diferencaj de tiu malbonedukita Petro. »

Finfine, post longtempa subtera marŝado, la ĉekapa viro haltis antaŭ bronzpordo kaj frapis tri batojn laŭ la maniero de la framasonoj.

La pordo malfermiĝis, seke, kaj Guynefort estis senprokraste enkondukita, sen ia ajn el tiuj inkviziciaj formalajtoj, kiujn li antaŭe spertis.

Enirante, li estis tuj sufokata de ekstrema varmego, kaj plurfoje malfermis kaj fermis la buŝon kiel karmo tiritita sur la sablon.

- Ne timu – diris unu el la kondukantoj, – ĉi tie iom varmas, sed estas same kiel en la maŭraj ŝvitbanejoj, oni rapide alkutimiĝas.

Tion dirinte, la du nekonatoj gvidis la bonan Guynefort-on tra vastegaj subteraĵoj loĝataj de uloj okupataj de diversaj distraĵoj. Ili ludis per ĵetkuboj, je fandita ĉevalo, je mareloj, je la porkino, je kaŝludo, je averse-reverse, je forka kverko, je para-nepara, je polmoludo, kaj aliaj ludoj multe amuzaj kaj sportaj.

Tiaj ŝtiparoj, kiaj tiuj de la surteraj inkvizitoroj, kaldronegoj, pikstangoj, rostiloj, rostokradoj, patoj por friti la pekulojn, tute malestis.

Tie kaj tie, ili renkontis fantastajn estaĵojn dotitajn per malgrandegaj kornoj por teni sian ĉapon, kiuj prigardis la loĝantojn de tiuj subteraj loĝejoj, kaj de tempo al tempo, faris juĝan ekzekucieton, ĉu negravan ĉu pli severan laŭ la kazoj.

Ĉar ili preterpasis grupon okupiĝantan turmenti pastron, Guynefort ekkris :

- He ! Jen nia amiko la prioro de Saint-Agnan !

Kaj, scivoleme ekhaltante, li rigardis tri aŭ kvar ĝojajn kornohavajn diablojn, kiuj, uzante pezajn Ĝenovajn ormonerojn kiel ĵetdiskojn, ludis korkludon kun lia maljuna malamiko. Ne komprenu, mi petas vin, ke la prioro ludis kun ili, ne, li anstataŭis la korkon, kaj la diabloj pafis al liaj tibioj, kaj pro tio li laŭtege protestis.

- Li tro ŝatis la monerojn el oro, el arĝento, eĉ el kupro, kaj li estas punata pere de tiuj ĉi, – diris unu el la gvidantoj – Kiom utilis al li esti avara sur tero ? pleniginte sian zonmonujon per denaroj kroĉkaptitaj al ĉiu kaj al ĉiuj, al mizeruloj same kiel al riĉuloj ?

- Ni forlasu tiun malnoblulon, – diris la alia gvidanto, – li estis malameganta, profitema kaj avara ; li havas nur tion, kion li meritas.
Kaj ili preterpasis, dum la malfeliĉa prioro pardonpetegis la ludantojn, kiuj mokis lin.

Trairinte tiun etaĝon de kavernoj, Guynefort kaj liaj ĉiĉeronoj malsupreniris ŝtuparojn, kiuj kondukis ilin al suba etaĝo, de kiu ili plu subiris al tria subteraĵo, kaj tiel plu al aliaj. Ju pli malsupren ili iris, des pli kreskis la varmo, sed ĉar la transiro grade okazis, tial Guynefort tute ne estis ĝenata.

La mortinta parokestro kaj liaj kompanoj tiom longe marŝis kaj sobiris, ke ili fine troviĝis en bela kaj vasta ĉambro, funde de kiu, sur podieto, dika viro kornhava kiel la forpasinta Moseo, sidis en simpla ligna katedro, kiun episkopo estus disdegninta. Tiu gajaspekta persono estis ĉirkaŭata de korteganoj kaj ankaŭ tiuj havis kornojn, sed kompreneble pli malgrandajn.

Malsupre de la podieto, kovrita per tapiŝo farita el papaj haŭtoj, tanitaj laŭ la taŭgaj metodoj, ĉiuj tri haltis, kaj unu el ĉiĉeronoj diris :

- Reĝa Moŝto, jen parokestro, kiun ni alkondukas al vi.

- Ankoraŭ unu ! – ekkriis Satano, – mi tuj devos pligrandigi la inferon por loĝi ĉiujn tiujn klerikojn ! Kaj kial vi venas tien ? li aldonis alparolante Guynefort-on.

- Ĉar oni ne akceptis min aliloke.

- Kaj vi venas al « refugium peccatorum », parokestro...

- Eĉ ! Ĉu vere ? mi tute ne estas kleriko.

- Do, kion fabelas Garifel ?

- Mi estis nur ŝajna parokestro...heredinte legitimilojn kaj pastrajn akreditaĵojn de kamarado mia, mortinta pro malsanatako de la fajro de Sankta- Antono.

- Kaj ĉu vi plenumis la pastrajn funkciojn ?

- Jes, kaj mi sendis al vi multe da homoj !

- Kiel do?

- Tial ke mi estis ne pli pastro, ol vi mem estas, tiuj , kiujn mi geedzigis vivis en konkubeco; la infanoj, kiujn mi baptis, restis makulitaj de la Adama peko; la mortantoj, kiujn mi absolvis tute ne estis absolutaj...kaj tiu tuta mortintaro venis rekte ĉi tien.

Kaj tiam, Guynefort detale rakontis sian tutan historion : la revivigon de la muŝo, la akvon ŝanĝitan en vinon, la reflorantan bastonon kaj kelkajn aliajn el siaj ruzaj trompoj, interalie la maniero kiel li skurgis sin.

Ĉiuj en la infera kortumo volonte ridis, ĉefe Lucifero, kiu eksplodis per rido kiel bona diablo kaj premis per la manoj al siaj flankoj, dum lia dika ventro skuiĝis.

- Proksimiĝu al mi! – li fine diris al Guynefort, – vi estas afabla gajdiboĉulo!

Mi volas komplezi vin. Nu, diru, ĉu vi deziras esti boligita aŭ rostita?

- Be!

- Ĉu vi preferas esti kradkuirita?

- Kiel Laŭrenco? Ne, dankon. Mi volas esti kuirpreparota per neniu el tiuj manieroj.

- Mia amiko, la dekretoj de la Providenco, kiuj anstataŭis la antikvajn decidojn de la Destino, same kiel tiuj, estas neflekseblaj ; do nepre necesas ke vi estu punota. Sed sume, el diabla vidpunkto, via peko estas negrava, ĉar vi estis bonkora, kompatema, gastigema, kaj ĉar mi ne estas tiu fabela ogro, per kiu oni timigas la infanetojn sur la debila planedo nomita Tero, vi ĉiutage ricevos tri skurĝbatojn...

- Ĉu tiajn, kiajn mi donis al mi...sur la tritikajn sakojn ?

- Sur la postaĵon, mia amiko, sur la postaĵon...per vulpovosto.

- Dankegon, Via Moŝto !

- Kaj, ĉar mi ŝatas la spritulojn, la homojn, kiuj havas inteligentecon kaj lertecon, mi anigas vin al mia kortego ; vi estos mia dentoskrapilportisto ; proksimiĝu al mi por ricevi la insignojn de via altrangeco.

Tiam supreniris la ŝtupojn de la podieto la parokestro Guynefort, kaj kiam li estis genuinta antaŭ la reĝo de la inferoj, tiu ĉi metis, ĉirkaŭ lian kolon, oran ĉenon, ĉe kiu pendis skatoleto riĉigita per juvelŝtonoj, enhavanta la reĝan dentoskrapilon :

-Vi starados malantaŭe de mi dum la manĝoj, kaj kiam mi estos vespermanĝinta per femuro de juna religiulino, taŭge dika, taŭge graseta kaj mola, tiam vi rajtos suĉi la dentoskrapilon, kiun mi estos uzinta...Ĉu ne ?

Ĉe tio, la tuta infera kortego rideksplodis kaj, ĉar la ceremonio estis finita, la ĝentilaj diabloj kondukis Guynefort-on ĝis la bufedo por trinko.

Kaj dum ĝojaj diroj interŝanĝiĝis, dum cirkulis vinflakonoj el Falerno, Kipro, Tenedo, la pokaloj da medo, da hipokraso, kaj dum la inferaj korteganoj tintigis la glasojn je la sano de la novveninto, sur la Tero, en la preĝejo de La Noaillette, oni plengorĝe kantis :

***Sankta Guynefort
Por la vivo kaj la mort' !***